# PREZIDANTA BULTENO

Universala Medicina Esperanto-Asocio | Fondita 1908 | Aliĝinta al UEA

## Stato de la UMEA

UMEA havas nun membrojn en 38 landoj.

## Interreto

La Tvitero-konto de la UMEA, @UMEAeo, havas nun 436 sekvantojn.

## Forpaso


La 9-an de Februaro 2022 forpasis d-ro Marian Łaba el Koszalin, Polando, en helpodomo por maljunuloj. Marian Łaba (kun Ewa Siurawska) estis inicatinto de esperantistaj renkontiĝoj ĉe Balta Maro. Li estis dum longa tempo Landa Delegito de UMEA. D-ro Marian Łaba tre bone reprezentis Esperanton ankaŭ dum la 6-a IMEK en Krakovo en la jaro 1987. Ni ĉiam pozitive rememoros lian aktivan agadon por UMEA kaj Esperanto.




## Milito en Ukrainio

Rusa armeo invadis Ukrainion kaj tiel komencis militon. Tiu ŝokis nin ĉiujn kaj finis longan periodon de paco en Eŭropo.
Multaj eminentuloj el Esperantujo kaj multaj esperantistaj organizoj oficiale deklaris, ke ili estas kontraŭ tiu milito. Kelkaj Esperanto-parolantoj deklaris, ke ili estas por la rusa atako, aliaj silentis. Kiel oni povas esti vera Esperantisto sen esti kontraŭ ĉiuj militoj ie ajn kun ĉiuj fortoj, kun tuta konvinko? Memkompreneble Esperantisto devas esti kontraŭ milito en ajna formo ie! Tute evidente la unua esenco de la Esperanto-movado estas forigi antaŭjuĝojn kaj kontribui al monda paco. Oni povas ja uzi Esperanton sen la deziro apogi la idealojn de la interna ideo. Sed kiu uzas Esperanton nur kiel lingva amuzaĵo sen aprobi kaj apogi ties kernajn idealojn, ne vere rajtas nomi sin Esperantisto kaj ne havas „verdan koron“. Preventi militojn kaj apogi pacon estis la vivosenco kaj motoro de niaj grandaj verkistoj kaj gvidantoj.
Se ni nun volas pruvi la valoron de niaj idealoj, ni devas esti singardaj por ne mem iĝi viktimoj de antaŭjuĝoj. Ni devas renkonti rusojn sen antaŭjuĝoj, se ni ne konas iliajn sintenojn al la milito en Ukrainio. Pripensu, kion diris Ludoviko Zamenhof mem en sia „Deklaracio pri Homaranismo“:
„Mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj. Ĉiun ofendadon aŭ premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, alia lingvo aŭ alia socia klaso ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.“

## Tradukhelpilo por prizorgo de rifuĝintoj




Surbaze de brokanta eldono de la libro „Ärztlicher Dolmetscher“ fare de d-roj Gert kaj Uta Hoyer, grupo de UMEA-anoj ĉirkaŭ kaj gviditaj de D-ro Lajos Molnár, pediatro, infektologo, radiologo kaj D-rino Julianna Farkas, okulkuracistino, fondintoj kaj gvidantoj de la 53-jara, Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo, preparis eltranĉojn en po tri lingvoj, t.e. angla-eo-hungara, angla-eo-hispana kaj angla-eo-germana por helpi rifuĝintojn. Pliaj versioj sekvos. Post permeso kaj aprobo de d-roj Hoyer dissendo al niaj UMEA-anoj okazos.

Tial mi mem estas kontraŭ la ĝenerala ekskludo de rusoj el kunvenoj de artistoj, universitatoj aŭ esperantistaj kongresoj. Kompreneble ni ne volas kunesti kun homoj, kiuj estas por la milito, kompreneble ni ne volas kaj ne rajtas doni forumon al personoj, kiuj varbas por la milito. Sed se ni ne konas la opiniojn de individuoj, ni, kiel Esperantistoj, ne rajtas renkonti ilin plene de antaŭjuĝoj aŭ simple eviti kontaktojn. Tiu ne decas al niaj rondoj.

Mi aŭdis opiniojn, ke kiam Ludoviko Zamenhof skribis sian deklaron, li ne antaŭvidis la teruraĵojn, kiuj nun okazadas en Ukrainio antaŭ niaj okuloj, kaj ke en tiu ĉi grandskala mortigado de homoj en Ukrainio ne estus temanta pri nura „ofendado", pri kiu skribis Zamenhof, sed konscia mortigado de ukrainia popolo kaj detruado de ĝiaj domoj kaj loĝejoj.

Mi mem pensas, ke Ludoviko Zamenhof bone konis la aĉan vizaĝon de milito, kiuj estis ĉiam la sama, nur en detaloj minimume deformita per historiaj maskoj. En la progromoj, kiujn ĉeestis Zamenhof, en la militoj de iaj migrantaj popoloj, en la militoj de la diversaj mezepokaj regnoj, en la mond-militoj ĉiam kaj ĉie la samaj krimoj okazis: buĉado de junuloj kaj maljunuloj, orfanigo de senkulpaj infanoj, vidvinigo de senkulpaj virinoj, perditaj kaj torturitaj geamantoj, seks-perfortitaj knabinoj kaj virinoj, senesperaj rifuĝintoj, detruo de domoj kaj kamparoj, malsato kaj ega malĝojo. Kio okazis dum progromoj en Bialistoko okazis aliloke antaŭe, okazas ekde multaj jaroj en Afriko, en Sirio kaj Jemeno, nun Ukrainio. Estas ĉiam la sama kaj ĝuste pri tiu Zamenhof pensis, kaj tiun li volis kontraŭi kaj finfine elimini pere de Esperanto. Kaj ĝuste tial la ideoj de Zamenhof estas validaj ankoraŭ hodiaŭ kaj restos validaj dum vivos homoj.

Mi aŭdis opiniojn, ke personoj, kiuj ne rekonas la homajn rajtojn de aliaj homoj, mem ankaŭ ne plu havas ilin.

Mi tute ne samopinias! Ankaŭ krimuloj ne ĉesas esti homoj. Nepre ni devas ĉiam respekti la homajn rajtojn ankaŭ eĉ de tiuj, kiuj mem ne respektas ilin koncerne aliulojn! Alimaniere humanismo ne povas montri sian forton, alimaniere tia idearo ne povas konvinki aliulojn. Ni Esperantistoj devas labori por daŭran progreson, ni ne rajtas respondi al homa fiasko per reciproka mispaŝo! Se ni neas homajn rajtojn al tiuj, kiuj ne respektas ilin, ni malaltigas homan kulturon al ilia nivelo kaj komencas mem disvastigi kaj fortigi grandan malbonon. Ni devas pensi antaŭen kaj antaŭenigi la mondon laŭ niaj povoj, jen nia tasko, jen la leciono, kiu nepre devas esti lernita el terura pasinteco!

Mi aŭdis opiniojn, ke rusoj, kiuj ne klare esprimas sin kontraŭ la milito, apogas ĝin. Tre strikta sinteno. Pripensu: ni scias, ke tia deklaro ene de Rusio nun estas punita per malliberigo. Do publikaj deklaroj kontraŭ la milito ene de Rusio necesas grandan kuraĝon kaj la pretecon pasigi 15 jarojn en gulago. Se vi tian kuraĝon postulas de rusa civitano, simple demandu vin, kiam vi mem lastfoje estis preta riski gravajn punojn kaj personajn malavantaĝojn kiam libereco, justeco aŭ demokratio estis endanĝerigitaj en via propra lando.

Fakte historio montris, ke ne povas esti ia „venko“ en milito. Milito mem jam estas malvenko de homeco, honto por la tuta homa familio, fiasko de ĉiuj niaj klopodoj, sendepende de kie en la mondo ĝi okazas. Milito estas la kulmino kaj sumo de ĉio elpensebla malbono.
Ni ege esperas, ke la milito en Ukrainio baldaŭ finiĝos!
UMEA pretas disponi sian internacian reton kaj rimedojn por apogi rifuĝintojn aŭ gekolegojn el Ukrainio laŭ sia forto. Kelkaj ekzemploj por bona kunlaborado tiucelen jam ekzistas. Same UMEA volonte agos por viktimoj de ĉiuj aliaj militoj en la nuna mondo.

Nepre ni kombinu ĉiujn niajn fortojn por kontribui al daŭran pacon en la tuta mondo!

Sed kiel komenci la praktikan laboron por paco? Paco komencas per nia konduto je individua nivelo. Paco devas esti instruita al infanoj. Kompreneble, uzo kaj disvastigo de Esperanto povas esti grava kontribuo.
Fortigu internacian asocion, kiu celas pacan kunlaboron je ia tereno, per via formala aliĝo!
Lernu ion pri la teorio de paco, ekz. per la aktivaĵoj de la Fondaĵo Berghof aŭ similaj organizaĵoj: https://berghof-foundation.org.
Lernu kaj praktiku senperfortan komunikadon: https://eo.wikipedia.org/wiki/Senperforta_komunikado
Kaj tute serioze: se vi volas kombini fizikan trejnadon kun por paca sinteno kaj lernado pripensu praktiki aikidoon, movarton, kies nura esenca celo estas la disvastigo de paco: http://esperanto-aiki.de/o/?lang=eo

Christoph Klawe




Paĝo el „La verda koro“ de Julio Baghy

## Projekto pri KOVIM-19 de germana lernejo - kun versio en Esperanto

Projektgrupo de la Sankta Ursula Mezlernejo en Attendorn, Germanio, kunlaborante kun la Universitato Hohenheim kreis simuladon pri strategioj por limigi KOVIM-19. La simulado ankaŭ estas alrigardebla en esperanta versio: http://sowi.st-ursula-attendorn.de/politiklabor_a.htm?9

Jen foto de la lernejo:



## Epstein-Barr-Viruso estas kaŭzo de Multobla Sklerozo

Komence de la jaro aperis en la revuo „Science“ gravega artikolo, kiu pruvis, ke oni ne povas malsaniĝi de MS sen antaŭa infekto per EBV:

https://pubmed.ncbi.nlm.nih.gov/35025605/

Tiu pruvo vere gravas, ĉar espereble eblos forigi ofte handikapantjn malsanon per vakcinado. Problemo nur estas, ke taŭga vakcino kontraŭ EBV el diversaj kialoj ankoraŭ ne ekzistas. Pri la rezultoj kaj la konsekvencoj de la menciitaj esploroj estos raportita kadre de la venonta IMEK.

## Medicina Internacia Revuo

La scienca kvalito de nia MIR estas ĉefe savita per artikoloj el la farmacia fakultato de la Jagielona Universitato en Krakovo. Se niaj UMEA-anoj mem ne baldaŭ decidos kontribui al la enhavo, la ekzisto de nia prestiĝa revuo, aktiva en daŭra maniero ekde 1923, estas endanĝerigita! Estas honto, se kuracisto ne povas kaj pretas priskribi interesajn kazojn aŭ almenaŭ verki mallongan resumon pri aktuala temo. Ĉar MIR aperas nur dufoje jare, vi eĉ havas duonan jaron por preparo de via artikolo. Estas vera risko, ke MIR ĉesos aperi! La eldonantoj vidas daŭripovon nur, se sukcesos akiri Indeks-faktoron en internacia datumbazo de medicinaj artikoloj. Por tiu, altkvalitaj artikoloj estas bezonataj. Ne hezitu verki ion, la eldonantoj certe apogos vin.

## Preparo por la 22-a Internacia Medicina Esperanto-Kongreso (IMEK) en Hódmezővásárhely kaj Szeged, Hungario, progresas

Aliĝo al la 22-a IMEK nun eblas. Estos ege interesa programo. Por pli detalaj informoj, bv. konsulti la retpaĝaron de la kongreso:
https://interrev.com/imek2022/?page_id=243
Denove la IMEK okazos en hibrida formo, do por partopreni ne nepre necesos persona ĉeesto.